# LA MALBONA OKULO

Homilio de Pastro Alberto Maggi, publikita en la revuo “Adista” la 30an de julio 2011°

Ne estas facile akcepti iun Dion, kiu anstataŭ ol premii la bonulojn kaj puni la malbonulojn, male “levas Sian sunon sur la malbonulojn kaj bonulojn” (Mt.5,45), donante al ĉiuj sian amon. Tia Dio ŝajnas maljusta, kiel la mastro de la parabolo rakontita de Jesuo (Mt.20, 1-15). En ĝi estas prezentata domomastro kiu permone varbas kamparajn taglaboristojn por sia vitejo. La graveco de la laboro devigas la mastron mem foriri frumatene por eniri la placon de la vilaĝo kaj tie dungi laboristojn (Mt. 20,1). La salajro estis po unu denaro por la tago, kaj estas tiu kiun la domomastro promesas al la laboristoj. La granda disponeblo de manlaboristaro eblis ke per ununura alvoko de laboristoj oni povis plenumi la bezonon por la tuta tago. Kontraŭe, per surprizo, cirkaŭ je la naŭa matene, la domomastro denove foriras por serĉi aliajn laboristojn. Tion li ne faras por la bezono de la vinberĝardeno, la unuaj alvokitoj estas pli ol sufiĉaj, sed li tiujn ĉi permone varbas ĉar ili ankoraŭ estas senlaboraj, kaj esti sen laboro en tiu medio signifas ne povi manĝi. Estas ilia bezono, kiun la domomastro pripensas. Kaj al tiuj ĉi li promesas doni rekompencon surbaze de la farita laboro (“kiom estas justa”, (Mt.20,4).

Meze de la tago la mastro denove revenas en la placon, kaj dungas aliajn laboristojn, kaj la samon li faras je la tria posttagmeze. Nun jam en la vinberejo estas sufiĉe da laboristoj, sed la domomastro estas pli zorgoplena pri la fakto ke ekzistas senlaboruloj ol pri sia profito. Kaj estas jam preskaŭ la sunsubiro, je preskaŭ la kvina posttagmeze, kiam la domomastro iras serĉi aliajn homojn, kiujn neniu vokis por labori. Mankas nur unu horo antaŭ ol la labortago finiĝos, nun jam neniu plu dungos ilin por labori. Ili ne laboris, do ili ne manĝos. Se neniu pripensis ilin, ilin prizorgos la mastro de la vitejo, kiu vokas eĉ ilin por labori, sen paroli, tamen, pri iu ajn rekompenco: eĉ ne unu horo ili laboros, kaj ili povos esti repagitaj per panpeco.

La placo de la vilaĝo estas senhoma. Neniu manlaboristo atendas laboron: ĉiuj estas en la vinberĝardeno, kiu superabundas je laboristoj. Tiuj kiuj komencis la laboron ĉe la tagiĝo estis tre ĝojaj vidi alveni dum la tuta tago aliajn laboristojn por helpi ilin en sia laboro; per ilia kontribuo la tago ne estis peza. Ilia ĝojo ŝanĝiĝas en entuziasmon kiam ili vidas ke la domomastro komencas pagi la lastajn, tiujn kiuj laboris dum nur preskaŭ unu horo, kaj ke li donas al ili unu denaron: ne temas pri salajro, sed pri donaco. Se kiuj laboris dum unu horo ricevas kiom oni interkonsentis kun la unuaj laboristoj por unu tuta tago, al tiuj kiuj elportis la ŝarĝon de la tago kaj la varmegon, certe, estos donite almenaŭ la trioblon. Sed kiam tiuj ĉi vidas ke oni kompensas ilin per unu denaro kiel oni interkonsentis, ili elverŝas sian seniluziiĝon kaj sian malbonan humoron, ĉar ili estis certaj ke “ili ricevos pli” (Mt. 20, 10) kaj opinias ke la mastro estas maljusta. La mastro de la vitejo ne estis maljusta (tio, kion li promesis, estas tio, kio estis donita), sed li estis malavara. Li nenion forprenas al tiuj kiuj laboris de la ektagiĝo, sed li volas doni la saman salajron ankaŭ al la lastaj.

Defendante sian konduton, la mastro de la vitejo sin difinas bona ("ĉu via okulo estas malbona tial, ke mi estas bona?", (Mt. 20,15). En la sinteno de la mastro de la vinberĝardeno, Jesuo bildigas tiun de la Patro. Dio ne estas severa mastro, sed estas malavara sinjoro kiu ne kompensas la homojn laŭ iliaj meritoj, sed laŭ iliaj bezonoj, ĉar Lia amo ne estas disdonata kiel premio, sed kiel donaco. Kio motivas Lian agadon estas la necesaĵo de la homo kaj sia feliĉo. Kaj se al iu ajn tiu ĉi sinteno povas ŝajni maljusta kaj al tiu ĝi ne taŭgas, tio okazas ĉar la sia estas "malbona okulo" (Mt.20,15), ĝuste tiu de la avarulo, de la enviemulo (Read. 15,9), de tiu kiu ĉion faras por sia profito. Tiu ĉi neniam povos kompreni la agmanieron de Dio kiu ne "celas por si mem" (I Kor.13,5) sed celas por la homo.